


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 1/1981 ★ 5 kr

SEF
1906-1981
75



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★
Telefon: 08 - 11 74 34 ★

EsperantoCentro är öppet måndag
— torsdag kl. 17 — 19 ★ **Postgiro:**
20 12-3, Esperantoförbundet ★
Medlemsavgift: direktansluten
medlem 50 kr, ungdomsmedlem
under 26 år 25 kr, familjemedlem
(utan tidning) 15 kr ★
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften ★
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet SEJUs
blad *ktp*.

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet ★ **Adress:**
EsperantoCentro, Brunnsgatan 21,
11138 Stockholm ★ **Ansvarig
utgivare:** Bertil Åkerberg ★
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
telefon hem 08-712 82 91 ★
Prenumeration: 40 kr per år,
postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet ★ Tidningen
utkommer med åtta nummer per år
★ **Fotosats och tryck:**
EsperantoCentro, Stockholm 1981

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö
★ **Besöksadress:** Möllevångsgatan
20 B ★ **Öppettider:** 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17
— 18 ★ Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även under
sommaren ★ **Telefon:** 040-12 20 29
★ **Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:**
Wivi Nilsson ★ **Styrelsens
ordförande:** Åke Blomberg



HODIAŬ

SEF jubileas dum 1981: Ni uzu la jubileon por laboro, ne por retrorigardoj!

SEF fariĝas ĉijare 75-jara. Tiun jubilean jaron la svedaj esperantistoj eniras kun optimismo kaj laboremo. La ĵus pasinta jaro signifis maturecprovon, kiun ni sukcese trapasis: organizi internacian kongreson, kiu laŭ ĉiuj mezuroj montriĝis brila pruvo pri nia fortenco kaj samtempe havi laborfortojn por la ordinara esperantolaboro. Ne nur: eĉ entrepreni kaj realigi pli da novaj projektoj ol kutime.

Sub tiaj cirkonstancoj sentiĝas facile festi 75-jaran jubileon. Oni ne bezonas retroiri al la historio por trovi argumentojn, ke grava laboro estas farita de la jubileanta organizo. Tiun gravan laboron ni faras ĉiutage, en la hodiaŭa historio! Ni ne bezonas doni ekzemplojn pri tio: la numeroj de *La Espero* estas plenaj je ili.

Sed jubileoj ankaŭ signifas respondecon. Ni ŝuldas al ni mem kaj al tiuj, kiuj estas proksimaj al niaj ideoj, efikan daŭrigon de la laboro. Ne sufiĉas en jubilea jaro fari la samon kiel dum la aliaj: ni devas kaj kapablas fari pli! Ni montris tion pasintjare. Ni ĉijare dediĉu la laborfortojn uzitajn por la kongresa laboro al laboro por SEF, al varbado de novaj membroj, de novaj kursanoj. Ni rimarkis pasintjare, ke tio eblas. Ni scias, ke la gejunulojn allogas la ideo pri internacia lingvo: plejparto el la leteroj ricevitaj lastatŭtune venis de junaj homoj. Ni varbu ilin al SEF, al la kursoj kaj kluboj.

Sed kiam ni turnas nin al la junaj homoj, ni faru tion en maniero, kiu estas alloga al ili. Ni bone pripensu, kio estas la argumentoj uzotaj, ĉu ili taŭgas por la hodiaŭa junularo, por la hodiaŭa mondo. La hodiaŭaj gejunuloj estas iasence dorlotitaj. Ili kutimas je kvalitaj lerniloj, modernaspektaj presaĵoj, profesiecaj argumentoj. SEF havas parte tiajn helpilojn — do evitu elfosi el viaj tirkestoj la materialon, kiu altiris vin al la esperantomovado. Ĝi povas esti interesa por historiisto, ne por hodiaŭa junul(in)o. Vi varbu gejunulojn, sed per metodoj, argumentoj kaj helpiloj allogaj al ili. Se vi varbas ilin al la klubo, zorgu, ke ĝi, la klubo, povas doni ion interesan al ili.

Jes, tio estu nia celo dum la jaro, kiam SEF festas la altan aĝon de 75 jaroj: ni turnu nin al tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas 20-jaraj. Ni faru tion ne en organizita kampanjo, sed individue, persone, tiel kiel ni plej bone kapablas. Kaj ni kapablas! La lernejoj estas pretaj akcepti nin, la gejunuloj komprenas niajn argumentojn. Ek!

Franko Luin

INNEHÅLL/ENHAVO

- 2/Hodiaŭ: SEF jubileas dum 1981
- 3/Många nyheter i en "ny" tidning
- 4/Esperantonytt
- 5/SEJU ger ut broschyr med SIDA-bidrag
- 5/I slutet av mars träffas SEJU igen
- 6/Dags för Malmö: fyll i blankett
- 6/Kurs i Kramfors för norra Sverige
- 7/Opinio de nesvedo pri Aniaro-traduko
- 9/TEMO: Surprizaj malkovroj en la maraj fundoj
- 10/"Pura" energio por la estonteco
- 11/Pluvos citronosuko sur la Akropolon
- 11/La mirinda nazo de la kamelo
- 12/Maldika kuprofolio promesas miraklon
- 13/Marjorie Boulton: Ne nur leteroj de plum-amikoj
- 17/Tabulo
- 18/Jes&Ne
- 19/Persone: Ankaŭ seriozaj viroj kelkfoje atentindas
- 20/Babels torn

Många nyheter i en "ny" tidning

Detta är ett ordinarie nummer av *La Espero*. Tidningen kommer i fortsättningen att se ut så här. Formatet är något mindre, men i gengäld är omfånget så mycket större. 20 sidor har ett ordinarie nummer sällan haft efter andra världskriget. Nu har i alla fall det otroliga hänt och det är inte helt omöjligt att fler nummer kommer ut på lika många sidor.

Numret bjuder på några nyheter som kanske kräver en liten förklaring.

1. TEMO heter den största nyheten. Hela fyra sidor helt på esperanto kommer i fortsättningen att bära detta namn. De första "temo"-sidorna handlar om vetenskap, vad nästa kommer att handla om är ännu inte helt klart, men alla ämnen är tänkbara för detta avsnitt av tidningen: natur, humor, teknik, fritid, litteratur, turism, barn osv. Förslag på teman är mycket välkomna; tanken är att olika gästredigerare ansvarar för dessa sidor.

2. ESPERANTONYTT återfinns som rubrik i *La Espero*. Medlemmarna får på detta sätt del av innehållet i den lilla skriften. Här kommer du att hitta notiser om de viktigaste esperantohändelserna i världen.

3 BABELS TORN är reserverat för tidningsklipp som visar hur snett det kan vara med den

rådande språkordningen. Redaktören tar tacksamt emot alla lämpliga klipp, särskilt ur fackpress.

4. MARJORIE BOULTONS bok om esperantolitteraturen kommer att publiceras i sin helhet i *La Espero* under 1981, som något slag av följetong. Du får en bättre förståelse för esperantoböckerna när du läst den. Boken är faktiskt mycket bra!

5. Sedan tidigare känner du igen de andra rubrikerna: **HODIAU** med redaktörens tankar om esperantorörelsen; **JES&NE**, med notiser om allt möjligt; **PERSONE** med en kåserande text kring esperanto; och **TABULO** med små annonser, som visat sig vara mycket populär redan efter några få införanden.

6. Vad som saknas och som egentligen borde finnas i *La Espero* är en regelbunden rubrik om klubbarnas verksamhet. Får redaktören bara tillräckligt med rapporter, uppstår en sådan rubrik av sig själv. Under tiden kommer sådana rapporter att publiceras under **JES&NE**, i mån av utrymme.

Utrymme finns förstås för artiklar utanför rubrikerna, dels med information om vad som händer, dels med opinion om vad som behöver göras. *La Espero* är din tidning: läs den, skriv i den, använd den!

Franko Luin



Är esperanto något för EG?

"Europaparlamentet" kommer att undersöka esperantos lämplighet för att lösa EGs språkproblem. Till detta förslag och till beslutet kom parlamentet efter en motion av den belgiske parlamentsledamoten Coppeters och efter behandling av frågan i ett utskott. En arbetsgrupp inom parlamentet är redan tillsatt och kommer att samarbeta med *Europa Esperanto Centro*, med säte i Belgien. Detta EEC har under flera år informerat, i samarbete med olika esperantoförbund inom EG-länderna, alla parlamentsledamöter om esperanto.

Undersökningskommissionen kommer också att ta upp esperantos roll i utbildningen.

Zamenhof ämne för avhandling

Vid universitetet i Lund kommer under våren en doktorsavhandling om Zamenhof, esperantos upphovsman, att disputeras. Doktorand är Hans Henrikson och hans avhandling bär titeln: "Doktor Esperantos broreligion — en studie av religiösa drag i den tidiga esperantismen".

Doktorsavhandlingen, som i manusform omfattar c:a 260 sidor A4, tar upp L.L. Zamenhofs "religiösa" idéer, deras ursprung och påverkan på esperantorörelsen. Med 'religion' menar författaren egentligen det vi normalt kallar för 'världsåskådning' — framförallt Zamenhofs idéer om broderskap mellan folken.

Ett fjärde kontor i Budapest

Internationella Esperantoförbundet, UEA, kommer att öppna ett fjärde kontor i Budapest, efter de existerande kontoren i Rotterdam, Antwerpen och New York. Till Antwerpenkontoret har man nyligen köpt ett hus. Ett femte kontor är planerat i Tokio.

Genom denna geografiska spridning av kontoren tror man sig kunna bättre hålla kontakt med olika mellanfolkliga organisationer, med vilka UEA samarbetar.

På programmet vid universitetet

Sedan i höstas har universitetet i Shanghai återtagit esperanto på sitt studieprogram. Esperantokurserna avbröts, liksom överallt annanstans i Kina, under kulturrevolutionen. I Peking fortsätter esperantokurserna vid universitetet, med 60 studerande vid institutionen för främmande språk.

Fler nya förbund bildade i Kina

Efter omorganisationen av det kinesiska esperantoförbundet och upptagandet av organisationen i UEA, håller regionala och lokala organisationer på att bildas i snabb takt.

Man rapporterar om nya förbund i provinserna Hunan, Anhui, Xian, Giansu.

Som rikstidning har *Verda lampiro* etablerat sig, trots att den kommer ut i den relativt lilla staden Changsu.

Esperantogata i Malmö

Kommunfullmäktige i Malmö beslöt fredagen den 23 januari 1981 att ge namnet **Esperantogatan** åt huvudgatan i ett nyplanerat område, söder om Kulladal. Området kommer att bebyggas efterhand, men redan nu har namn på gatan beslutats.

Esperantogatan kommer att presenteras vid en rundtur i Malmö annandag pingst.

Även i Sovjet ökar intresset

I Sovjetunionen håller esperanto snabbt att vinna terräng. Det språkvetenskapliga institutet vid Sovjets vetenskapsakademi har godkänt två doktorsavhandlingar som har interlingvistik som ämne [interlingvistik är vetenskapen om bl a esperanto].

I Krasnodar har esperanto godkänts som ämne vid universitetet.

I Estland har vid utbildningsministeriet en kommitté bildats med uppgift att ta fram läromedel för esperantoundervisningen. Esperanto är enligt det nya läroplanet fakultativt ämne i alla skolor.

Studentkurser i Venezuela

Universitetet i Caracas, Venezuela, som är landets största, har satt igång kurser i esperanto för studenter vid samtliga fakultet. Kurserna har utarbetats i samråd med landets esperantoförbund.

Esperanto slår ut idrott

I Årjäng håller esperanto på att slå ut idrotten som populäraste FA-ämne i skolan. Till vårens *fria aktiviteter* har 71 elever i åk 7, 8 och 9 valt esperanto, vilket betyder c:a 25% av samtliga i dessa årskurser. De olika idrottsgrenarna har valts av 72 elever, om man lägger ihop alla grenarna.

Det stora intresset i skolan är en följd av flera års gott arbete, som en följd av en internationell konferens som Freinet-rörelsen (rörelse för en ny pedagogik) har anordnat i Årjäng 1978. Vid denna konferens spelade esperanto roll som officiellt språk vid sidan av franskan och svenskan.

Efter konferensen leddes en kurs av red. Bertil Danielsson, som även började med en esperantokurs i sin tidning *Nordmarksbygden*.

SEJU ger ut broschyr med SIDA-bidrag

SEJU — Sveriges Esperantisternas Ungdomsförbund — har fått något så ovanligt som ett bidrag från SIDA, Styrelsen för internationell utveckling, för att ge ut en broschyr om språkproblem i tredje världen.

I slutet av 1980 blev broschyren klar. Författad av Leif Gunnar Karlsson och försedd med titeln *Språk och makt — Språkfrågan och tredje världen*, tar på 12 textsidor upp olika aspekter av språksituationen i u-världen. Redan en hastig titt på rubrikerna anger broschyrens innehåll. Under den första huvudrubriken "Språkfrågan i världen" hittar vi följande rubriker: "U-länderna: En fråga om att överleva" med en koncentrerad historik; "Kolonialmakterna: Ett sätt att behålla kontrollen"; "Språk leder till ekonomiska fördelar", som tar upp British Councils argument för att få höga statsanslag; "Förenta Nationerna: Flerspråkigheten kostar stora pengar".

Den andra huvudrubriken heter "Lösningar". "Språkutbildning och tokning" anges som en tänkbar lösning, dock med frågetecken. "Det internationella språket: En möjlighet" heter broschyrens avslutande rubrik. Låt oss citera några avsnitt ur denna kapitel för att ge exempel på broschyren.

"Samfärdseln mellan olika länder och världsdelar har aldrig tidigare varit livaktigare än nu och behovet av ett allas andra språk har inte heller någonsin varit större. I många u-länder har också intresset för det internationella språket ökat under de senaste åren.

I Kina har esperantoklubbar grundats över hela landet. De har ordnat kurser och kontakter med främmande länder.

Universitetet i Teheran har under de senaste åren undervisat i esperanto. Under de senaste åren har tusentals elever deltagit i dessa kurser. Esperantoverksamheten har fått stöd både av den gamla shah- och den nya muslimska regeringen. Badiollah



"Språk och makt" heter en broschyr som SEJU har gett ut med ekonomiskt stöd från SIDA.

I slutet av mars träffas SEJU igen

Nu tänker SEJU-medlemmarna träffas igen, den här gången i Lidakyrkan, som ligger någonstans i Stockholmstrakten. Fast det är en kyrka, tänker SEJU inte blanda in religion på något vis. Träffen är förlagd till helgen den 27 — 29 mars och den kostar, hör och häpna!, 50 kronor. Anledningen till att det är så billigt är att SEF betalar hyran, men bara på villkor, att man visar omgivningen att man finns och inte sitter inne och trycker hela dagarna.

Pengarna betalar du in på postgirokonto 66 41 50-0, Esperantoförbundet.

Något direkt program är inte klart ännu; så mycket är dock klart, att man på lördag går ut och gör sig förtjänt av pengarna från SEF.

Det är heller inte helt säkert att

Samimy, som är initiativtagare till Teheranuniversitetets esperantokurser menar att ett internationellt språk är en nödvändighet för u-länderna. Detta för att de skall kunna hänga med i den internationella tekniska utvecklingen.

En representant från Organisationen för Afrikas Enhet besökte 1979 Universala Esperanto Asocios (Världsesperantoförbundets) kongress i Luzern i Schweiz och uttryckte sitt intresse för det internationella språket.

Det internationella språket är mycket lämpligt som världsspråk. Det är lätt att lära sig, men trots det mycket uttrycksfullt. Det är ett neutralt språk som inte skulle gynna några stater på bekostnad av andra."

SIDA står med sitt anslag för tryckning av broschyren, medan SEJU svarar för distributionen. SIDA-pengarna räckte till för 1 500 exemplar, som håller på att distribueras. Huruvida broschyren blir tillgänglig för SEF-medlemmar vet vi i skrivandes stund ännu inte.

det blir vad några ifrån Stockholm har tänkt att ordna under de här dagarna, nämligen att bilda ett Stockholms EJU.

Var ligger Lidakyrkan och hur kommer man dit?

Lättaste sättet är att åka över Stockholm, med pendeltåg från Centralen mot Västerhaninge. Från Västerhaninge åker du buss 844 till Lidakyrkan.

Tågen går 5 minuter efter varje halv- och heltimme från Centralen. Bussar avgår strax efter tågens ankomst till Västerhaninge.

Det kommer att finnas folk på plats i "kyrkan" från kl 16.00 på fredag eftermiddag. Om det skulle uppstå problem på vägen kan du ringa 0752-296 29 eller 296 30 efter detta klockslag.

Det är bra om du har sovsäck med dig.

Dags för Malmö: fyll i blanketten!

Innan du läser vidare: ta fram inbetalningskortet som finns med i detta nummer av *La Espero*, fyll i det med ditt namn, kryssa i de rutor som behövs och gå med det till posten (eller skicka det till postgirot). För det är klart att du ska vara med på denna jubileumskongress! Det blir kanske årets enda esperantoevenemang i större skala för dig!

Det finns många goda skäl för att åka till Malmö just i pingst. Här kommer några:

★ Malmö är en trevlig stad. Det vet redaktören som bott där under några år.

★ SEF och Förlaget kommer att ha sina årsmöten där. Kom, lär dig något nytt, var med och påverka!

★ Malmöklubben tänker fira 75 år samtidigt. Detta gör de genom att visa *Sveriges första Esperantogata!* (Den finns ännu inte, men beslut är fattat om den).

★ Claude Piron, lektor vid universitetet i Genève, författare (Johán Valano) kommer att hålla föredrag om *Problemoj en inter-nacia lingva komunikado*.

★ Särskild jubileumshögtidlighet den 6 juni, med olika korta föredrag, bl a av Ebbe Vilborg om *Generala lingvoinstruado en la svedaj lernejoj*.

★ Du kan få bo på Sjöfartshotellet, nära Centralstationen och alldeles intill Sjömansgården, som kommer att tjäna som kongresslokal.

★ Malmöklubben kommer vid flera tillfällen att visa sin föreningslokal och bjuda på kaffe.

★ SEJU, KEF, SIEF, SEFA och kanske också SLEA kommer att ha arbetssammanträden

★ Du kan få kongressens särskilda poststämpel med tre olika datum.

★ Det kommer att finnas två olika utställningar: en för allmänheten på Stadsbiblioteket och en för kongressdeltagarna i kongresslokalen.

★ Du får med kongresshandlingarna den finaste turistbroshyren du nånsin sett på esper-

anto — och det är inte skryt! Den handlar om Malmö, förstås.

★ Du får vara med på två olika kvällsprogram med intressanta inslag.

★ Och så får du vara med och prata esperanto under hela fyra dagar; det behöver du, när du inte kan vara med på årets världskongress därborta i Brasilien.

Om du behöver veta mera, skriv till *Esperantokongressen i Malmö 1981*, c/o *Torsten Lund, Falkmansgatan 7 B, 217 62 Malmö*.

Kurs i Kramfors för norra Sverige

Den 17 och 18 januari anordnade SEF en kurs/konferens i Kramfors. Kursen hölls i samarbete med Vuxenskolan och Esperantoföreningen i Kramfors. Gertrud Bengtsson, Gunnel Svensson och Viviann Andersson skötte förberedelserna lokalt. Från SEF medverkade Roland Lindblom och Birger Vigen. I övrigt var vi tretton deltagare från Öjebyn, Piteå, Skellefteå, Umeå, Sundsvall, Gnarp och Bergvik. Som kurslokal hade man valt hotellet i Bollstabruk, där också de flesta av oss övernattade.

Efter inkvartering och kaffe bekantade vi oss med varandra och diskuterade kursens målsättning. Lunchrast följde och därefter kom lördagens höjdpunkt: informationsteknik. Det var Gunnel Svensson och Viviann Andersson som skötte den delen.

Vi pratade till en början om hur bra information ska se ut. Där visades som exempel ett ljudbildband som presenterar Vuxenskolan. En slutsats av den följande diskussionen var att vi måste vinnlägga oss om att inte gå ut till allmänheten med alltför

Vid jubileumskongressen i Malmö kommer en minnespoststämpel att finnas för brev och brevkort. Om du kommer till kongressen själv, ordnar du själv att du får poststämplarna (tre olika dagar).

Du kan få hjälp med dem, om du skickar färdigskrivna och frimarkerade brev/kort till *Torsten Lund, Falkmansgatan 7B, 217 62 Malmö*. Tala om vilka som ska postas vilka dagar.

Klubben har låtit trycka särskilda brevkort. De kostar 1 kr styck plus 1,15 för porto. De kan beställas via postgiro **62 23 71-3, Esperantokongressen i Malmö**.

amatörmässig information.

Avsnittet om kontakt med massmedier gav många bra tips, bland annat:

□ försök skapa någon personlig kontakt med lokaltidningarna;

□ det är en fördel om man själv kan skriva referat och artiklar; risken för sakfel minskar!

□ man har rätt att ta del av en artikel där man citeras, före publiceringen; om något fel har smugit sej in kan man begära att få rättelse införd.

Ett lite mer praktiskt avsnitt hade man fått med också. Vi fick efter en inledande genomgång själva prova på att utforma flygblad och annonser med hjälp av färdiga bilder och "gnuggisar".

Efter middagen redovisade vi våra arbeten och sedan fick vi besök av Rolf Tourd från Svanö närradio. Han skulle ha inlett sin presentation av närradios möjligheter med en utsändning av ett litet program på esperanto, där bl a Gertrud Börgesson medverkade. På grund av något tekniskt missöde fick vi vänta till

senare på kvällen för att höra programmet.

Rolf Tourd pratade förutom om esperantoföreningarnas möjligheter att komma in i närradion bl a om en idé han fått om att göra en liten esperantosketch på film.

Resten av kvällen gick i underhållningens tecken: först i form av en trubadur, Bertil Galin, som sjöng egna och andras visor till gitarr. Han stannade också kvar när vi övergick till att sjunga på esperanto.

Till kvällens program hade övriga medlemmar i Kramfors Esperantoförening inbjudits och ett tiotal av dessa deltog.

Söndagens program leddes till stor del av Roland Lindblom.

Vi fick en genomgång och diskuterade en stund om vad som händer och kommer att hända angående esperanto i skolan.

En större del anslogs till frågan om klubbarnas arbete. Roland förde fram synpunkten att vi kanske måste ifrågasätta den traditionella arbetsformen.

Vi delade os upp i grupper och diskuterade några punkter:

□ Kan man bedriva klubbarbete utan protokoll?

□ Måste klubben arbeta med spridning av esperanto?

□ Arbete utan klubbar?

Då vi samlades efter lunch kom vi fram till följande sammanfattning:

Vi behöver klubbar som bas för arbetet. Det är nödvändigt, till exempel, vid officiella kontakter.

Antalet kaffemöten med formella protokoll skulle kunna minskas till förmån för arbete i 'projektgrupper', alltså då några medlemmar jobbar för ett inte alltför avlägset mål. Det är lättare att få folk att ställa upp i en sådan grupp än för en styrelsepost som kan kännas betungande.

Det är viktigt att utnyttja enskilda medlemmars förutsättningar, till exempel vid kontakter med skolan eller andra föreningar.

Till slut får jag som representant för deltagarna tacka alla som gjort träffen möjlig. Den var mycket givande och jag tror att vi behöver samlingar av den här typen oftare för att utbyta erfarenheter och för att få fart på föreningsarbetet.

Gunnar Farm

Opinio de nesvedo pri Aniaro-traduko

Jam pasis baldaŭ du jaroj post la apero de Aniaro en esperanta traduko. Kiel oni akceptis ĝin? Kion oni opiniis pri ĝi en eksterlando? Vi trovos ĉi sube recenzon de Rikardo Ŝulco, kiu mem tradukas librojn en esperanton. Lia recenzo aperis en Vestfaliaj flugfolioj.

"Jen libro, kiun oni, anstataŭ recenzi, devus prikanti per himno, ĉar ĝi estas peco de grandioza poezio. Eble tamen ne per himno, sed prefere per elegio, ĉar ĝi estas libro plena de amara pesimismo pri la stato de la homaro kaj pri ties lasta destino. Tiu destino ŝajnas sen elirvojo konduki en malesperan perein.

Aniaro estas propra nomo. Ĝi estas la nomo de certa "goldondo", t e specifa tipo de spacŝipo, kiu konstruiĝis en serio de mil ekzempleroj por ebligi laŭ rutina trafiko homan elmigradon al Marso kaj Venuso. La goldondo estas preskaŭ kvin kilometrojn longa kaj preskaŭ kilometron larĝa. Ĝi enhavas 230 halojn, inter ili eĉ halegojn, senfine longajn koridorojn kaj kvar mil ĉambrojn por almenaŭ dekmil personoj.

Okaze de iu ĝia veturo la goldondo Aniaro elkursiĝas pro ĝis tiam nekonata meteorido, kaj post kelkaj sensukcesaj manovroj devas fine rezigni la provon reveturi. Ĝi forlasas definitive la hejman sunsistemon kaj komencas, direkte al la konstelacio Liro, sencelan vojaĝon en la malpleno. Aniaro do estas la eposo pri la historio de la samnoma spacŝipo dum ties senalvena veturado tra la senfina spaco kaj samtempe pri la destino de ties ŝipanaro kaj pluraj miloj da pasaĝeroj.

La eposo konsistas el cent tri paragrafaj versaroj, kies plej longa ampleksas 186 versojn (40: *La rakonto de la spacmatroso*, kvazaŭ eposeto en la eposo) kaj ties plej mallongaj (23, 25, 66 kaj 101) po ses versojn. La unuopaj versaroj ofte subdividiĝas en versogrupojn de diferenca longeco, kelkfoje eĉ en regule

konstruitajn strofojn (ekzemple 83). Plej ofte troviĝas kvinpiedaj jamboj, finiĝantaj per senakcenta silabo. Ili estas blankaj aŭ rimataj. Sed ankaŭ aliaj ritmoj troviĝas, ekzemple troviĝas forte efektanta kvinpieda trokeo (92) aŭ pli mola, pli lirika amfibrako (54: *La ĝardeno de Ĉefoneo*). Ĉu severe formita, ĉu malpli severe uzata, la lingvaĵo estas en ĉiuj partoj de la eposo de altnivela poezio kaj de rara beleco, eĉ tie, kie ĝi celas nekompreneblecon, kiel ekzemple en la sekreta funebro-kanto *Libidella* (73) kun la trifoje ripetata rekantaĵo: *Ho nudik nu / nudisu plu / en liutarbar' por du*, kaj eĉ tie, kie Dejzi Dudi parolas en *bela idiom' dorisurbana* (12, 27). Al la beleco de la lingvaĵo kontribuas ankaŭ agrable sonantaj propraj nomoj personaj kaj geografiaj kaj la multaj mistere teknikaj neologismoj, kies proksimumajn signifojn sufiĉe klare supozigas la kunteksto kaj kiujn la tradukintoj certe ne intencas altrudi al la esperanta vortrezoro. Aperas la virinoj Heba, Hebeba, Isagela, Jala, Gena, Libidela kaj Nobi. Nomiĝas teraj, planedaj kaj kosmaj loko-indikoj, ekzemple Antalekso, Setokajdo, la valo Dorisa, la kampo Sari-dek-ses, la militekstermita urbo Gond en la lando Gondo, la lando Rind, la kabo Atlanta, la nebulozo Golmos, la spaco Ghazilnuta, la Dorajmaj altoj, la asteroido Hondo. Al la teknikaj esprimoj ekzemple apartenas girospiro, magnetrinoj, giramata, vebtakisoj, protatoro, telegratoro, fonoglobo, jendrokurboj kaj multaj per la radiko *gopt-* formitaj vortoj kiel *goptologio*, *goptovolbo*, *goptoformulo* kaj aliaj.

La goldondo Aniaro do veturas senhalte tra la senfina spaco, falas abisme en la malpleno. La jaroj pasas, la sesa en la versaroj 5 kaj 6, ankoraŭ en 13 kaj 19, la dek unua en 53, la dek dua en 69, la dek naŭa en 81, la dudeka en 82, la dudek kvara en 97 kaj 99, ĝis fine en 103 la goldondo Aniaro, komparebla al *ostoplena muzeo*

dum dek kvin mil jaroj tiriĝas kun konstanta rapideco al la Liro. Dudekjara vojaĝo egalas al nur dekseshora distanco laŭlonge de lumjaro. *Lumjaro estas tombo* (2).

Nu, ni iomete pripensu! Kia diferenco fakte ekzistas inter la pasaĝeraro, kiu vojaĝas en Aniaro, kaj tiu, kiu estas portata tra la abisma faŭko de la malplenaĵo sur la spacŝipo Tero? Oni povus paroli pri kvanta diferenco. Sed ĉu oni ankaŭ povus paroli pri kvalita diferenco? Mi kredas, ke ne. Ni do ne trompu nin! **Aniaro** estas parabolo. La goldondo Aniaro funde ne estas io alia ol nia planedo. Temas do pri la destino de ni ĉiuj. Ni ĉiuj vojaĝas en Aniaro.

Jen proksimume la ne tro facile raciigebla parto de la verko, la ekstera kadro. Nun devus sekvi la klariga kaj priskribata prezentado de la ĉiam denove ŝanĝantaj internaj, multfacetaj aspektoj kaj agoj, per kiuj tiu kadro estas plenigita. Sed ĉi tie ĝuste komenciĝas la verdire poeziaj vizioj de la verkisto, la profunde veraj aludoj, la terure ŝokantaj aŭ korotuŝe impresaj ekkomprenoj pri psikaj cirkonstancoj, statoj, krizoj. Ilin racie analizi estus preskaŭ nebla tasko, kaj la rezulto apenaŭ atingus la efekton, kiun havas la legado de tiu intense kunpremita, fascina versa verko. Ĝi forte impresas ĉiujn tavolojn de la konscio kaj subkonscio. La leganto tiel intuicie komprenas eĉ tion alie nekompreneblan. Ĉiu unuopa el la paragrafaj versaroj ŝajnas esti la kvintesenco de longaj meditadoj, kaj ĉiu inverse povus fariĝi elirpunkto de tiaj meditadoj.

Centran rolon en la verko ludas la multajn fojojn menciita Mimo. Pri ĝi la aŭtoro en sia enkonduko klarige helpas la legonton. Ĝi (aŭ ŝi, ĉar kelkfoje ĝi estas ina!) estas komplike konstruita aŭtomato, kiu enigme superas sian inventinton. Eĉ por tiu mem ĝi duone *ne analizeblas*. Ĝi estas kvazaŭ la eksteren projekciita materiigita homa menso, inkluzive de ties transcende ĉion ampleksanta spirito. Ĝi estas funkciigata de la mimopri-zorganto, la *mimarobo*, kiu estas identa kun la rakontanto de **Aniaro**. La inventaĵo ebligas elvoki ĉion, kio iam ie okazis. Ĝi estas la eterna memoro kaj ne elĉerpebla konsolanto de la homa ŝarĝo konsekrita al pereco (6).

La pasaĝeroj jen serĉas forgeson en Turba dancado (12), jen idolatre adoras multaspecajn revojn. Ili ĉiam denove serĉas distron per mimospektakloj (16), sed postrestas nur froste tremiga disreviĝo. Kontraŭ ilia angoro, kontraŭ la martiro en Aniaro, ne ekzistas savo (18). La spacŝipo estas kvazaŭ tineo en la kosmo (87). Bildoj estas elvokataj, teruraj militoj, *phototurbe* detruitaj urboj (26), kiuj pensigas pri Hiroŝimo, sed ankaŭ ekzemploj de abnegacia helpa sindonemo, pensigantaj ekzemple pri Elzino Brandŝtrojmo, la "anĝelo de Siberio". Tiam kaj tiam io eksterordinara, eĉ sensacia okazas: la ĉefastrolobo mortas (23); mistera lanco preterflugas Aniaron kaj mirigas kaj konsternas ĉiujn, ĝi *tamen trafis* (53); Aniaro traveturas nubon el kosma sablo, estiĝas paniko kaj damaĝoj (69); mortinta merita ĉefingeniero ricevas honoran entombigon (78).

Unuopaj versaroj traktas specialajn temojn: antaŭspegula kanto de Libidela (42); la blindulino (49); la ĉefkomikulo Sandono (50, li ŝajnas kvazaŭ memoro pri la klaŭno Grok'); mimosplitoj (52); la spacmatroso (71); kanto de Gond (86); mortatestilo (94).


Oni ĉiamaniere volas mastri la situacion. Precipe la mimarobo klopodas plu funkciigi la mimon malgraŭ paneoj kaj grava defekto. Ĉefoneo, iuspeca plej supera estro, iu Hitlero aŭ Stalino, kiu eĉ en Aniaro havas sian *ĝardenon en spac' flugprivatan*, malliberigas la mimarobon, sed nepre bezonante lian sperton, ree liberigas lin. Aranĝiĝas sciencaj prelegoj. Ekzistas ankaŭ Pensarkivo (44). Oni kalkulas la Aniaran *espermalmulton*, aŭskultas *sonmonerojn*, ludas per *mimosplitoj*. Astronomo prelegas pri nova stelo (55), rakontas pri *glaciono* (60). La mimarobo kreas fantaziekranojn ambaŭflanke de la goldondo. Sed ankaŭ tiuj ne kapablas plenigi la internan malplenenon de la homoj (61), li prelegas pri goptologio, kolego lia prelegas pri goldondokonstruo, spac-historiisto prelegas pri spacveturado (76), per teleskopo oni observas kosmajn vidindaĵojn (77). Pri galaksio oni komprenas kaj tamen ne komprenas (85).

Malgraŭ ĉio la spirita konfuziĝo kreskas. Krom la plu vivanta kristanismo estiĝas sektoj, kies anoj interpuŝiĝas, vaginon kultantoj, kriaĵ Turbinoj, libidinoj, tiklistoj, fajron adorantoj, pentfakiroj. Oni serĉas forgeson per drogoj. Pensado kaj fantazio formortas. Eĉ larmoj komencas manki. Ĉirkaŭe oni vidas nur stelojn. La pereokomenco alvenis. Mistero disiras de la morta Mimo. Aniaro malpleniĝas, fariĝas sarkofago. Lumoj ne plu troviĝas (100). La galaksio daŭras (102). La Aniaranaro mortas vane (102). *Kaj tra ni ĉiuj la Nirvano ondis*.

Oni ne atendu ekscitan sciencfikcian romanon. Facila legaĵo tiu libro ne estas, sed leginda ĝi estas. Oni legu kaj miru! Eble — kiel mi — oni ne nur miros, sed admiros.

Verŝajne kion ni nomadas spaco kaj vitroklaro ĉirkaŭ Aniaro estas spirit' eterna, nekaptibla, kaj ni perdiĝis en spiritomaro. (13)

Rikardo Ŝulco



ANIARO - pensiga en la sveda, miriga en esperanto. Ĉefverko de la esperanta traduka arto. Laŭ aspekto unu el la elstaraj libroj en esperanto.

Ĉiuj laŭdas ĝin, ĉiuj admiras ĝin. Eksciu mem kial!

Pagu 72 kr al la suba adreso kaj ĝi venos rekte hejmen al vi. Por via pripensado kaj admirado.

Esperantoförlaget, Box 7502, 200 42 Malmö, poŝtĝiro 578-5


Surprizaj malkovroj en la maraj fundoj

La maro estas grandega kaŝejo de eblaĵoj ankoraŭ nekonataj al la homo. Jen kaj jen oni aŭdas pri grandegaj trovaĵoj de mineraloj sur la marfundo, pri mineraloj kaj kemiaĵoj troviĝantaj en la marakvo, pri la amaso da organikaj substancoj, kiuj eble helpas la homaron en iu estonta granda malsatkatastrofo.

Oni jam multon prenas el la maro. Da kelkaj maraĵoj eĉ tiom, ke ili estas malaperantaj, fiŝoj, ekzemple. Ke oni prenas nafton el la marfundo, fakte desub ĝi, tion scias jam ni ĉiuj. Sed troviĝas substancoj en la maro, kiuj estas gravaj en alia maniero. Rigardu ekzemple la algon *Macrocystis pirifera*. Ne eblas montri ĝin sur

unu foto, ĉar ĝi kreskas je duona ĝis tuta metro po tago kaj povas atingi la longecon de cent metroj. Ĉi tiun brunan algon oni jam uzas. Oni povas kulturi ĝin kaj ĝi estas ŝatata manĝaĵo por kokinoj, kaprinoj kaj ŝafinoj. El ĝi oni ricevas algenojn, kiuj estas uzataj en la manĝaĵindustrio, ekzemple en fabrikado de gelaĵoj [glaciaĵoj] kaj en farmakologio.

Alia substanco, algenacido, havas tute nekutimajn ecojn. Ĝi povas helpi la korpon liberigi de stroncio 90, unu el la plej danĝeraj radioaktivaĵoj. Stroncio 90, kiu ekestas je atombombaj eksplodoj, malpurigas la atmosferon kaj ligiĝas kun la verdaĵoj,



El maranemono oni ricevas substancan, kiu aktivigas kontraŭ tumoroj.



per kiuj la homo ricevas ĝin en sian korpon. La korpo absorbas ĝin kaj ĝi povas kaŭzi leŭkemiojn kaj tumorojn. La algenatoj malebligas, ke la korpo absorbu stroncion 90.

Esplorado pri la substancoj entenataj de la algoj kaj de aliaj maraj organismoj fariĝas pli kaj pli vasta. El alia algo, de la ruĝa speco, *Chondrus crispus*, oni ricevas gelatinaĵon, kiun oni uzas en la manĝaĵindustrio; sed ankaŭ ĝi havas medicinajn aplikojn, ekzemple kontraŭ gripo.

Tio, kio malhelpas, ke la esplorado en la maro estu eĉ pli ampleksa, estas la altaj kostoj ligitaj kun ĝi.

Ne ĉiuj eltrovaĵoj estas novaj. Jam antaŭ 4000 jaroj oni uzis iun fiŝon el la familio de la tetraodontedoj kontraŭ kelkaj malsanoj. Moderna priesploro montris, ke ĝia hepato enhavas toksinojn, el kiuj unu, tetradotoksino, estas nun uzata en kirurgio kiel muskolmalstreĉigilo.

Nur tre sistema kaj vasta esplorado povas konduki al gravaj malkovroj. La gigantoj inter fabrikistoj de medicinaĵoj dum kelkaj jaroj pliintensigis la esploron de la organismo, troveblaj en la maro. Esplorinstitutoj troviĝas nun, kaj ili katalogigas la marvivaĵojn en la Mediteraneo, en la Pacifiko, en la maro ĉirkaŭ Aŭstralio.

Mara farmakologio estas, kie koncepto, ne pli ol dudek jaroj aĝa. En 1960 okazis unua konferenco tiutema en Nico.

Ni menciis komence grandegan algon kiel ekzemplon de novspeca ekspluatado. Sed tri interesajn rezultojn donis ankaŭ la plej malgrandaj maraj organismoj, planktono, en kiu oni malkovris tre utilajn kontraŭbakteriajn substancojn — manao por farmakologio.

"Pura" energio por la estonteco

Antaŭ ekzakte dek jaroj aperis en Svedio eta libro de profesoro Gösta Ehrensvärd: *Antaŭe — Poste* (Före — Efter, 1971) Ĝi vekis nekutime multe da diskutado pri nia hodiaŭa socio, pri la eblecoj pluvivi kaj adaptiĝi al la estonto. Tropopoliĝo kaj foruzo de necesaj vivrimedoj kondukos nin al vivo tute malsama al nia hodiaŭa, estis lia resumo. Unu el la ĉefaj faktoroj, kiuj influos la estontan vivnivelon estas la haveblo de energio. Laŭ li la demando estis eĉ pli simpla: ĉu ni sukcesos solvi la problemon de fuzia energio aŭ ne, estos decidaj pri la estonteco.

"Se ni iam solvos la majstradon de la fuzienergio por teknikaj uzoj, tio devos okazi jam dum la venontaj cent jaroj. Ĉirkaŭ la jaro 2070 kaj pli poste ni havos plenajn manojn je problemoj tuŝantaj pluvivadon. Nun la esplorado pri fuzia energio devus ricevi absolutan prioritaton..." opiniis profesoro Ehrensvärd. Sed li samtempe konsciis, ke la laboroj solvi la problemojn de tiu energifonto estas eksterordinare malfacilaj kaj tempe tre foraj.

Kio estas fuzia energio kaj kial nia estonto dependu de ĝi?


Unue klarigo: fuzienergio ne estas fisienergio, aŭ atomenergio, kiel ni nomas ĝin ĉiutage. Dum fisio neŭtrono trafas nukleon de peza atomo, ekzemple urano, kaj disigas ĝin en pli malpezajn nukleojn kaj en neŭtronojn, kiuj sume havas malpli da maso. La malaperinta maso fariĝis energio. Dum fuzio nukleoj de malpezaj elementoj, ekzemple hidrogeno, ĵetitaj unu kontraŭ la alia je grandega rapideco, batiĝas kaj kunfandiĝas konsistigante nukleon de helio. Ankaŭ dum ĉi tiu procedo

iom da maso "perdiĝas" kaj transformiĝas en energion.

Fuzio havas kelkajn avantaĝojn, teorie, kompare kun fusio. Ne ekzistas la riskoj de radioaktiveco, oni utiligas preskaŭ senkostajn substancojn, kiuj krome estas haveblaj en pli-malpli senlimaj kvantoj. (La kvanto de urano estas limigita kaj finiĝos ĉiukaze post kelkaj jardekoj).

Se la avantaĝoj estas tiel evidentaj, kial oni ne havas fuzian energion jam nun? Pro la fakto, ke la tekniko fuzienergia estas tre komplikita kaj postulas temperaturon nehaveblan sur la tero. Tiaj temperaturoj estas ordinaraj sur la suno, kie atomfuzio daŭre okazas. La atomoj de

ol sur la suno. Sed ankaŭ eblas atingi la samon per pli malaltaj temperaturoj uzante du variaĵojn de "peza" hidrogeno, nome deŭterio kaj tricio. Kaj ĝuste ĉirkaŭ ili turniĝas la esplorlaboro pri fuzienergio. En Usono oni jam sukcesis atingi temperaturojn je la alto de 60 milionoj da gradoj — unu el la kondiĉoj por realigi la fuzion. Restas pluraj aliaj malfacilaĵoj, unu el ili estas ke tricio estas radioaktiva. Ŝajnas, ke oni jam survojas al la solvo ankaŭ de tiu problemo. Alia substanco, helio 3, ne radioaktiva, anstataŭos tricion. Sed ĉar helio 3 postulus temperaturojn kvinoble pli altajn ol miksaĵo de deŭterio-tricio, tio ne estas mo-



En la suno fuziado okazas konstante kaj la liberigita energio radias i.a. al la tero.

hidrogeno en la centro de la suno estas sub tiel forta gravita forto, ke iliaj nukleoj perdis la eksteran elektronenvolvadon kaj plasmigiĝis. Koliziantes je rapideco de plurmil kilometroj po sekundo ili kunfandiĝas kaj fariĝas helio. Malgranda parto de ilia maso "perdiĝas" kaj fariĝas energio, kiu radias, interalie, al la tero.

Por atingi fuzion de atomoj de hidrogeno sur la tero, oni bezonas temperaturojn eĉ pli altajn

mente tre facile realigebla solvo. Pro tio oni retenos tricion por la starto de la procedo, la neŭtronoj restas en la plasmaj kaj altigas ĝian temperaturon, ebligante ke helio 3 funkcii.

Helio 3 estas tamen tre malofta en la naturo kaj oni devos produkti ĝin en atomcentralo, ekzemple el tricion. Do ankaŭ per ĉi tiu enerfonto ne eblos eviti radiadon. La fizikistoj konkludas tamen, ke la atomcentraloj bezonataj por produktado de helio 3 povos esti lokigataj en dezertoj aŭ aliaj foraj regionoj, dum la centraloj por produktado de fuzia energio povos tute facile konstruiĝi meze de urboj.

Pluvas citronsuiko sur la Akropolon

La konstruaĵoj kaj statuoj sur Akropolo en Ateno dum kelkaj jarmiloj rezistis la tempon, militojn, naturkatastrofojn — kial? Por malaperi kiel sableroj sub la pluvoj de nia tempo. Sed ne nur Akropolo. Simila sorto atendas konstruaĵojn kaj artaĵojn kie ajn, kie la pluvoj povas atingi ilin.

Pluvis multe sur Akropolon dum la jarmiloj — do ni ne kulpigu la pluvon, ĉar ne temas pri la akvo, sed pri tio, kion la akvo kunportas.

En Svedio ni ne havas Akropolojn. Sed niaj lagoj acidiĝis, kaj pro la samaj kaŭzoj. Mezuroj pri la acideco de pluvo montras multfoje valorojn ĉirkaŭ 4, tio estas acideco ĉirkaŭ 3 gradojn sub la neŭtra valoro 7.

Kion signifas "acideco" de iu fluidaĵo?

La kemiistoj uzas t.n. pH-skalon, kun valoroj inter 0 kaj 14, rilataj al la kvanto de jonoj de hidrogeno [elektre ŝarĝitaj atomoj de hidrogeno]. Fluidaĵo estas neŭtra, se ĝia pH estas 7; se

ĝi superas 7, ĝi estas baza, se ĝi malsuperas, ĝi estas acida. Nemalpurigita pluvo kutimas havi valoron 5,6, do estas iom acida. Citronsuko havas la valoron pH 2.

Se pluvas pH 4 sur Akropolon, estas kiel se pluvus iom akvigita citronsuiko.

Sian acidecon la pluvo ricevas de la aero. En ĝi libere flugas grandegaj kvantoj da fumo, kiuj enhavas restaĵojn de sulfuro kaj nitrogeno el forbruligitaj karbo kaj naftaĵoj: de elektraĵa centra-



loj, fabrikoj, aŭtoj, hejtejoj. En la malseko de la aero la sulfuro kaj nitrogeno ligiĝas kun oksigeno kaj acidiĝas, t.e. fariĝas sulfuroksido kaj nitrogenoksido. Tio poste falas sur nin, kiam ni promenas en printempa pluvo kaj fajfas.

La mirinda nazo de la kamelo



Jam en la lernejo oni lernas pri la eltenemo de la kameloj en la dezertoj, speciale pri ilia eltenemo rezisti sen akvo dum longaj periodoj.

Kontraŭe al la kredo, ke la kamelo stokigas akvon en grandaj kvantoj en la stomako aŭ eĉ en la ĝibo, oni nun scias la kaŭzojn.

Plej bone eltenas la unuĝiba kamelo, dromedaro. Jam dum kelkaj jardekoj la sciencistoj konas, ke la tuta korpo de la dromedaro estas konservejo de akvo. Sed krom tio la dromedaro estas bone izolita, tiel ke la korpo bezonas longan tempon por varmiĝi. Tio malhelpas, ke ĝi

ekŝvitu kaj perdu akvon tiuvoje.

Sed ankaŭ elspirado estas granda perdofonto. La elspirita aero estas plena je vaporo (tial via spiro estas videbla dum la vintro). Sciencistoj malkovris, ke la aero elspirita de kamelo estas neordinare seka kaj eĉ malpli varma ol la temperaturo de la besto. Fakte malvarmigado de aero aŭtomate maldensigas la vapordensecon.



La respondojn oni trovis en la nazo de la kamelo. Eĉ laŭvide ĝi estas granda, sed ĝuste la grandeco ludas gravan rolon. En la nazo estas amaso da faldoj, tiel ke la vojo, kiun la aero devas pasi survoje internen kaj eksteren, estas neordinare longa. Oni mezuris, ke la tuta surfaco estas ĉirkaŭ okdekoble pli granda ol de homa nazo.

La faldoj kaj la tuta surfaco





estas kovritaj de muka membrano, kiu absorbas la vaporon, kiun surhavas la eliranta aero. En tiu procedo la aero estas malvarmigata. Kiam la kamelo enspiras sekan dezertan aeron, la aero kunportas la malsekaĵon internen en la korpon, la membrano pro tio malvarmiĝas kaj sekiĝas, tiel ke ĝi povas reabsorbi la malsekan elirantan aeron. Oni eĉ mezuris la ŝparon de vaporo, kiun la kamelo atingas per tiu procedo: 68 procentoj de la akvo kutime perdita per elspirado. Ĉi tiu sistemo kaj la preteco de la korpo adapti sian temperaturon al haveblo de akvo, igas kamelon eksterordinare taŭga por defiado de la dezertoj.



La sola maŝino produktanta la kuprofoliojn kaj, sube, pruvo per varmiga lampo antaŭ peco de la kuprofolio.

la brila flanko de la maldika folio (35 milonoj de milimetro) la absorbita energio redoniĝas en formo de varmo.

La principo estas sufiĉe simpla. Ni ĉiuj scias, ke ni vestu nin hele dum varmaj someraj tagoj, ĉar la sunradioj pli efike reflektiĝas de helaj surfacoj, dum ni evitu malhelajn ŝtofaĵojn, ĉar ili absorbas la varmon.

Oni povas ankaŭ doni alian ekzemplon. Se oni ĵetas elastan pilkon dur malmolan surfacon, ĝi resaltos alten. Se oni ĵetas la saman pilkon sur, ekzemple, muskon (kaj al musko oni povus kompari la dendritaron), ĝi sensalte restos sur la musko.

La kuprofolio estas inventita en Belgio, kie ĝi lastdecembre ricevis la unuan premion en internacia ekspozicio de inventaĵoj.

Kian energian signifon havas ĉi tiu folio?

Mezuroj faritaj en Belgio montras, ke eĉ dum nuba tago la sunenergio, kiu trafas unu kvadratan metron da surfaco estas ĉirkaŭ mil vattoj. El ili 840 estas transformeblaj en varmon per la kuprofolio. En unu jaro oni povas ricevi la ekvivalenton de 1000 kilovatthoroj. Se oni kalkulas, ke oni ricevas ĉirkaŭ 7 kilovatthorojn el unu litro de mazuto, unu kvadrata metro de la kuprofolio povus ŝparigi en unu jaro iajn 144 litrojn de mazuto.

La uzebleco de la kuprofolio estas ĉefe en varmigado, ĉar la sunenergio (lumo) rekte transformiĝas en varmon; kaj krom tio eblas senpere varmigi aeron. Oni povas do imagi al si, ke la folioj estos uzataj en domoj (unu ekzemplo estas persienoj el metalaj lamenoj) aŭ sur iliaj muroj.

La folio estas ankoraŭ produktata en malgranda skalo en fabriketo en Belgio. La fabriko estas posedata de la belga ŝtato, kiu investis multe da mono en la esplorklaboron. Sed la intereso pri grandskala produktado estas grandega, ankaŭ pro alia faktoro: la folio estas malmultekosta. Unu kvadrata metro estas havebla por malpli ol 150 kronoi

Maldika kuprofolio promesas miraklon

Suno, maro, tajdo, energiarbaroj — ne mankas proponoj pri alternativaj energifontoj. Pli malfacile estas trovi solvojn, kiuj estas ekonomie realismaj kaj donas sufiĉajn kvantojn da energio. Suno senpage brilas de la ĉielo, varmigante la teron. Sed utiligi la energion, kiu tiel abunde falas sur nin, estas alia afero.

Sunĉeloj estas la ĝis nun plej multe uzata kaptilo de la sunenergio. Sed sunĉeloj havas plurajn malavantaĝojn. Ili estas kostaj kaj eĉ grandskala seria produktado ne sufiĉe malaltigus la kostojn; kaj ili ne estas speciale efikaj. Ili povas utiligi nur 17 ĝis 23 procentojn de la sunenergio.

Oni povas do kompreni la ekscitiĝon, kiam aperas sur la

merkato produkto, kiu utiligas 84 procentojn de la sunergio kaj kostas nekompareble malpli.

La inventaĵo (ĉar pri tio daŭre temas; grandseria produktado ankoraŭ ne komenciĝis) estas tre maldika folio de kupro, preparita kemie tiel, ke ĝi aspektas malbrila kaj preskaŭ nigra je unu flanko kaj arĝente brila je la alia. Se oni rigardas la malbrilan flankon tra elektrona mikroskopo, oni povas vidi, ke la surfaco aspektas kiel densa eteta arbaro. Da ĉi tiuj "arboj", aŭ dendritoj, el la greka vorto dendron, kiu signifas arbo, oni povas nombri 27 milionojn sur unu kvadrata metro. La opakeco de la surfaco kaj la dendritoj kaŭzas, ke la sunradio absorbiĝas tre efike. Je

Ne nur leteroj de plum-amikoj

TEMPOSKEMO SCIENCFIKCIA EN REALA MONDO

Esperanto prezentas interesajn kaj unikajn fenomenojn kulturajn kaj lingvistikajn. Ĝi estas lingvo vere vivanta, plene funkcia por miloj da internaciaj komunikaĵoj diversnivelaĵ, ĉiutage; kaj ĝi estas lingvo, kies historion ek de ĝia naskiĝo oni povis observi.

Filologo tamen ne povus multe indukti, el la konata historio de esperanto, ĝeneralajn leĝojn pri la evoluado de lingvoj. La evoluado de esperanto estis kelkriate mala al tiu de naciaj lingvoj. Unu homo, L. L. Zamenhof, plenintence kaj plenkonscie kreis ĝin, laŭ elpensitaj principoj. Ĝi poste multe evoluis, laŭ homaj bezonoj, sub la plumo kaj en la buŝoj de la uzantoj, precipe per multe ampleksiĝanta vortostoko, sed ĉiam konservante ĉiujn esencajn strukturojn kaj obeante la principojn de Zamenhof.

Rakonto pri homunkuloj, pri Frankenstein, pri robotoj, esprimas verajn psikologiajn reagojn kaj verŝajne ankaŭ veran probablecon pri artefaritaj kvazaŭhomoj. Ni atendus, ke ia homumaĵo, kreita en laboratorio, estos ne tute homa, emocie malvarma aŭ eĉ tordita, sen vera homa personeco komplika kaj unika, sen mistera heredaĵo tiel riĉa de genetiko, historio, kulturo: io strange nekompleta, aŭ kompatinda, aŭ timinda.

Ni supozu, ke kontraŭ ĉiuj ŝajnaj probablecoj, sciencisto kreus en laboratorio ne kvazaŭhoman feton, sed belan knabon jam kapablan fari ĉiujn ordinarnajn taskojn de knabo kaj multajn de plenkreskulo; ke oni poste edukus tiun knabon inter aliaj knaboj, vaste kaj varie; ke tiu knabo iĝus matura viro bela, forta, sana, emocie varma kaj sentoriĉa, tre inteligenta, elokventa, logikema, kun multaj artaj talentoj kaj sciencaj scioj, kun agrabla voĉo kaj eĉ ĉarma humuro: do ne kvazaŭhomo interesa nur kiel eksperimenta-

ĵo, sed vere interesa kaj valora simpatia individuo. Kontraŭe al ĉiu tradicio kaj atendado — ĝuste tiel okazis pri esperanto, kontraŭe al ĉiu alia projektita internacia helplingvo.

Estas malfacile, eĉ por esperantistoj mem, plene koncepti kiel eksterordinara estas la nuna fenomeno de vigle vivanta esperanta kulturo. Min ĝi pensigas pri la fama paradokso de la frua kristana teologo Tertuliano: "Estas certe, ĉar estas tute neeble."

Eble la miraklo de esperanto estas miraklo de fido. Alivorte: eble temas pri ia psikodinamiko de fortaj sopiroj al paco, mondfratareco, interkomprenado, de malegoismaj sindediĉoj kaj artismaj entuziasmoj. Aliajn klarigojn proponas diversaj fakuloj kaj ideologianoj. Sed, kial ajn kreskis la semo tiel neatendinde, iu ajn nun rajtas gustumi la abundajn fruktojn.

Lingvoj kutime evoluadas dum jarcentoj ĝis iu esploras ilin science. Pralingvoj draste ŝanĝiĝas. Skribado venas longe post parolado. Tre malfrue aperas gramatiko intence organizita kaj gramatikaj kaj leksikologiaj preskriboj.

Esperanto naskiĝis en la unua libreto de Zamenhof (1887) kiel minimuma gramatika regularo, malgranda vortaro kaj kelkaj specimenoj de aplikado. Poste ĝi evoluadis riĉe kaj varie, sed jam kun preskribitaj limoj, kiuj malebligis, ekzemple, esceptojn kaj anomaliojn. La *Fundamento de Esperanto* (1905), akceptita de la jam internacia kaj aktiva esperantistaro, por ĉiam fiksas preskribitan bazon por la lingvo, lasante maksimuman liberon por la detaloj de aplikado.

La literaturo de esperanto estas eksterordinara parto de lingva fenomeno entute eksterordinara. La literaturo naskiĝis ĝemele kun la lingvo.

Naciaj literaturoj kutime komenciĝas per primitivaj verkoj, ekzemple kantoj pri amo aŭ batalo, krudaj tekstoj religiaj, naivaj kronikoj. Ĉiu esperantis-

to, eĉ dum la frua epoko, jam havis propran nacilingvan kulturon kaj evoluantan literaturon ne naivan. Multaj esperantistoj konis ankaŭ aliajn kulturojn, ekzemple la latinan kaj helenan aŭ tiun de najbara lando. Tial ili jam havis kelkajn kriteriojn pri literaturo, eĉ se ili ne formulis ilin.

Pri sia lingvo Zamenhof de la komenco sekvis saĝan principon de praktika provado. Li provis la uzeblecon de esperanto por traduki kaj verki originale, eĉ antaŭ la aperigo de sia unua libro. En la unua libro ni trovas: tradukojn de *Patro nia*, de kelkaj versoj de *Genezo* kaj de poemeto de Heine, kaj du originalajn lirikojn.

Kvankam tiuj lirikoj gravas ĉefe historie, kaj oni ne povus aserti, ke ili estas grandaj poemoj, ili havas poeziajn formojn kaj stilojn kompareblajn kun simplaj liriko en multaj lingvoj. Ili montras korektan, eĉ melodian metrikan, formalajn rimoskemojn, klaran kaj naturan esprimadon de emocioj, ordan kaj ekvilibrantan internan strukturon sintaksan, emocian kaj logikan, kontentigan memsufiĉan kompletecon.

Stranga estis la genio kaj eble pli stranga la fido de tiu judo, neforta, neriĉa, ne lingvisto, laŭ temperamento humila kaj retiriĝema, kiu kapablis verki literaturon akcepteblajn lirikojn en lingvo, kiun nur li en la tuta mondo tiutempe konis (Klara, kiel fianĉino kaj poste edzino de Zamenhof, ja frue lernis la novan lingvon, do ni ne scias precize kiajn siajn fruajn verketojn Zamenhof verkis tute sen leganto. Sed certe li ekprovis la lingvon literaturo, kiam li ankoraŭ ne povis havi eĉ unu leganton.)

Dumvive li daŭrigis siajn provajn laborojn per tradukoj el majstroverkoj de diversaj lingvoj. Jam en 1894 aperis lia *Hamleto*, kiu plejparte donas tolereblajn ekvivalentojn por li ŝekspira teksto, en la sama versformo kaj en stilo sursceneje parolebla.

Lingvo, kiu nur ebligis pluma-mikajn rilatojn tra la tuta mondo kaj faciligus turismon kaj komeron, estus utila. Sed ne nur tiaj utiloj celis Zamenhof. Multa esperantistoj havis, kiel multa ankoraŭ havas, seriozajn humanajn idealojn kaj kulturajn interesojn. Tiaj homoj havis ion

propran por esprimi: esperanto montris sin lingvo fleksebla, kun multaj latentaj esprimrimedoj. Tiaj homoj deziris pruvi, ke esperanto kapablas esprimi preskaŭ ĉion, kion povas esprimi nacia lingvo. Ne mankis nacilingvaj verkoj tradukindaj, sed ne tro facile tradukeblaj. Tiaj homoj konis multajn jam maturajn literaturajn ĝenrojn kaj metodojn, kiujn oni povos provi originale en la nova lingvo. Ju pli oni tiel esploris la esprimeblecojn, des pli sin manifestis riĉe variaj kaj koncize trafaj parolturnoj, kiujn ebligis lingvo samtempe tiel rigide disciplinita ĉe la bazo kaj tiel neordinare libera ĉe ĉio alia.

Jam dum la unua jardudeko aperis esperanta literaturo, traduka kaj originala, certe sufiĉa por pruvi la plenan vivantecon kaj literaturan taŭgecon de esperanto. Sed tiu unua roĵo de la monto kreskis tra la pli facilaj valoj en riveregon potencon. Nun ekzistas esperanta literaturo surprize vasta.

LA AMPLEKSO DE LA ESPERANTA LITERATURO

Verkante en 1977 (kaj ĝisdatigante la tekston en januaro 1981), mi skribas pri la amplekso de la esperanta literaturo sciante, ke ankoraŭ vivas en la mondo dekmiloj da homoj, kiuj naskiĝis, kiam esperanto ankoraŭ ne ekzistis.

Estus malfacile doni tute fidindajn statistikojn pri la nombro de esperantaj libroj. Ni devus unue difini, kiom granda devus esti iu presitaĵo por esti libro. La Butlerbiblioteko ĉe la Brita Esperanto-Asocio en Londono havas ĉirkaŭ 30 000 registritajn erojn, el kiuj 11 000 estas nedubeble *libroj*. La Bulgara Nacia Biblioteko en Sofia havas ĉirkaŭ 11 500 librojn en kaj pri esperanto; la biblioteko Hector Hodler ĉe UEA en Roterdamo ĉirkaŭ 10 000 erojn, el kiuj minimume 3 500 estas nedubeble libroj en esperanto. La Internacia Esperanto Muzeo en Vieno havas 17 721 librojn, plejparte en aŭ pri esperanto, kaj milojn da aliaj esperantaĵoj. (Kompreneble pri bibliotekoj la nombroj ĉiam grandiĝas, tiel ke

nijaj presitaj nombroj estas, neeviteble, jam tro malaltaj ...)

Kvankam multaj el tiuj libroj estas relative senvaloraj aŭ efemeraj, kaj artverkoj nepre meritantaj senmortecon ne abundas, tamen la supraj ciferoj evidentiĝas, ke esperanto jam posedas literaturon eksterordinare ampleksan post malpli ol jarcento.

En la katalogo de la libroservo de Universala Esperanto-Asocio 1980/1982, tio estas katalogo *nur de aktualaj libroj ankoraŭ aĉeteblaj*, mi kalkulis 1 616 diversajn librojn. Eĉ se oni subtrahas ĉiujn lernolibrojn, terminarojn, pedagogiajn lernolibrojn kaj porinfanajn librojn, bibliografiojn kaj primovadajn verkojn, ankoraŭ restas 1 102 libroj: romanoj, noveloj, rakontoj, teatraĵoj, filmoscenarioj, poezio, biografio, filozofio, historio, religio, politiko, scienco, tekniko, geografio,



himnaroj kaj kantaroj kaj miksitaj volumoj.

En la sama katalogo troviĝas listo de cent tridek esperanteldonejoj. Inter tiuj eldonejoj troviĝas kelkaj ne ĉefe esperantaj, sed eldonantaj esperantaj librojn inter aliaj; kelkaj, kiuj okupas sin nur pri politikaj aŭ religiaj propagandaĵoj kaj pluraj, kies eldonado estas tre malgrandskala. Sed ekzistas minimume dek ses sendependaj eldonejoj, kiuj regule aperigas librojn sufiĉe gravajn kaj kulture valorajn, bone prezentitajn kaj nur esperantajn.

Jam aperis en esperanto verkoj tradukitaj el literaturoj de kvardek landoj kaj pli ol kvardek lingvoj. Oni vidas bone, per la jam menciita librolisto de UEA, kiom da literaturaj ĝenroj reprezentigaĵas en esperanto per verkoj

tradukitaj kaj originalaj. Oni jam trovas en esperanto stilojn, kiuj varias ek de la plej simplaj anekdotoj taŭgaj por komentantoj ĝis kompleksaj grandskaj eksperimentaj verkoj.

Kompreneble ne ĉio eldonita estas altvalora. Ekzistas verkoj, kiuj celas provizi simplan legmaterialon por pedagogiaj celoj, nuraj propagandaĵoj de sinceraj idealistoj aŭ de pli potencaj organizoj, kies sincereco estas ofte pli duba. Ekzistas efemeraj polemikoj pri iu iaĵo aŭ edifaj prediketoj pri iu tiaĵo; ankaŭ verkoj, kiuj celas ian literaturan valoron, sed apenaŭ atingas ĝin, tradukoj ne sufiĉe sentemaj, originalaj artverkoj tro amatorecaj.

Sed restas rimarkinda kvanto da verkoj, kiuj atingas artan nivelon tian, ke oni povus serioze diskuti pri ili same kiel pri konataj artverkoj en nacia lingvo. Tio ĉi signifas, ke jam ekzistas esperantaj verkistoj, kiuj verkas same serioze, profesie, dediĉite, kiel nacilingvaj seriozaj verkistoj. La fakto estas des pli rimarkinda, se oni konsideras la nenormalan situation de serioza esperantista verkisto, kiu deziras verki artisme kaj do kies sinteno estas kvazaŭ profesia.

LA ESPERANTA VERKISTO: IZOLO, MALPROFITO, FIDO

Kvankam simpla provado de la eblecoj de la lingvo estis grava motivo por la laboroj de la pioniraj esperantaj verkistoj, ili ankaŭ estis, memevidente, veraj literaturamantoj. La plej bonaj verkoj staras sendepende, dignaj literaturaĵoj, ne nur sufiĉecaj specimenoj.

La fruaj verkistaj laboroj en esperanto sugestas ian purecon de motivoj, kiu ŝajnus al multaj io freneza, preskaŭ monstra: plenplena, sinofere persista semado de oraj grenoj meze de dezerto. Al pli poeziaj animoj ĝi eble ŝajnus estetike plaĉa, heroe nobla ĝuste pro la absurdeco. Zamenhof tradukis vastskale, multe verkis originale. Vastaj tradukaj laboroj de Antoni Grabowski inkluzivis la dekmilversan epopeon de Mickiewicz, *Sinjoro Tadeo*. Kazimierz Bein (Kabe) tradukis inter aliaj verkoj la romanegon de Prus, *La farao*

no. V.N. Devjatinin verkis kvar volumojn de originalaj poemoj. Stanislav Schulhof tri. Henri Valienne verkis du dikajn romanojn. Ĉiuj verkis antaŭ 1918, do antaŭ ol la lingvo estis 20-jara. Eta estis la publiko, duba la sukceso kaj malsukceso de la lingvo signifus ankaŭ senvalorigon de la tuta verkaro. Nur Kabe ial forlasis la aferon kaj li forlasis ĝin nur post servoj tiel kolosaj, ke ili antaŭpagis sian pardonon.

Kiel ofte en la vivo prudentaj homoj eraris kaj tiuj kaj multaj aliaj dohkiĥotoj pravis. La lingvo daŭre vivis kaj la literaturo kreskadis.

Tamen ankoraŭ en 1924 Kálmán Kalocsay, kiu iĝis unu el la plej grandaj esperantaj verkistoj, veis pri la sorto de "poeto sen popolo". (En *Amara horo, Streĉita kordo*, p. 34.)

Nuntempe esperanta verkisto certas almenaŭ, ke ekzistas publiko. Se unu eldonejo ne akceptas lian verkon, eble ĝi plaĉos al alia. Ekzistas gazetoj, en kiuj aperas seriozaj recenzoj kaj eĉ jam ekzistas en pluraj landoj, kaj internacie sub la aŭspicioj de UEA ekzamenoj, kiuj postulas fakan studadon de esperantaj verkoj. Sed la situacio de esperanta verkisto restas aparta kaj malavantaĝa.

Esperantistoj ĝenerale, kaj verkistoj speciale, ofte riskis multon kaj foje viktimiĝis, eĉ ĝis koncentreja pordego aŭ ekzekuta fosto sub diktatoraj reĝimoj. Malmulte gravas la politika koloro de la reĝimo. Sub iu ajn subprema sistemo tiu, kiu ebligas senperajn kontaktojn kun aliaj landoj, kaj tiu, kiu kapablas verki sindediĉe kaj sendepende, estas homoj iom danĝeraj. (Detaloj pri suferoj kaj foje eĉ martiriĝo de esperantistoj sub totalismaj reĝimoj troviĝas en *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins (1973) kaj en *Esperanto en perspektivo*.) Sed eĉ en landoj tre liberaj, tie kie nacilingva merkado portas prestiĝon, esperanta merkado ŝajnas ofte io tiel ekscentra, ke la verkisto sentas sin iom malhelpita kariere. Tiajn stultajn antaŭjuĝojn oni povas venki, se estas tempo por adekvata klarigoj. Sed iu elektokomitato por posteno kutime ne disponas tempon por diskuti tian flankan aferon.

Esperanta merkado estas ankoraŭ preskaŭ neniam pagita.

Esperanta eldonado ankaŭ ne povas celi bonan profiton, nur daŭran sinsubtenadon.

Estas neprobable, ke iu atingos veran literature valoran altnivelon en esperanto, kiu ne kapablas verki ĝis simila nivelo en nacia lingvo. Kutime tia laboro estus, kvankam ofte malmulte, pagita.

Ni ne forgesu, ke la esperanta verkisto devas verki ne nur sen espero pri materia rekompenco, sed kun certeco pri materiaj oferoj. Tiu verkisto laboras senpage, sed mem devas pagi sian paperon, siajn skribilojn, skribaŝinon, inkubandojn, karbo-paperon kaj tre kostan afrankon, ofte al eksterlando. El multaj landoj, pro la fiagoj de ŝtatoficistoj aŭ simpla nefidindeco de poŝtaj servoj, verkisto devas ankaŭ registri sian manuskripton, tre koste. Li ankaŭ ofertas



tempon, kiun li povus dediĉi al pagita merkado en nacia lingvo, aŭ eĉ al alia pagita laboro.

Zamenhof montris sin tre klarmensa, klarstila, diligenta. Li ege laboradis dum sia tuta vivo pro esperanto kaj en sia profesio de okulisto. Homo tiel genia certe povus verki, ekzemple, popularsciencajn verkojn, kiuj multe helpus lin finance. Julio Baghy, unu el la plej bonaj esperantaj verkistoj, ĉiam vivis tre malriĉe kaj multe suferadis pro siaj vivkondiĉoj. Li nepre havis la kapablon verki streĉajn nacilingvajn romanojn, kiuj eble tute ŝanĝigus lian financon situacion. Jam kiam li estis nur dudekjara li estis eldoninta plurajn novelojn kaj multajn poemojn hungarlingvajn en nacilingvaj gazetoj. Sed li poste dediĉis sin plene al esperanto.

Mi mem ne oferadis heroe. Dum nur du jaroj de mia vivo mi vivadis mizere laŭ okcidenteŭropaj kriterioj, kaj tiam mi ankoraŭ ne estis esperantisto. Sed mi estas profesia, kvankam ne eminenta, verkistino en la angla kaj mi iam kalkulis, ke ĉiu el miaj relative grandskalaj esperantaj verkoj malprofitigis al mi ĉirkaŭ 1000 pundojn [ĉirkaŭ 10000 kronoj], kiam mi konsideras, kian anglan verkon mi povus dum la sama tempo kaj per simila penado verki, kaj kiom da aŭtoraj tantiemoj mi povus ricevi (dum kelkaj jaroj, ne tuj) per tia verko.

Eĉ la plej nebona verkisto en esperanto meritas ian estimon, eĉ se ironian. Ankaŭ li ofertas tempon kaj monon. Li ofte montras kortuŝan idealismon, sinoferon kaj kulturajn aspirojn, kvankam li ne havas adekvatajn artajn kriteriojn, ekzemple pri strukturo, stilo, ordo. Li ne komprenas, ke vera merkado estas io malfacila, disciplina, iasence suferiga per senĉesa memkritikado. Sed li ja komprenas, ke li ricevos nenian salajron.

Tial ankoraŭ ne povas ekzisti profesia verkisto en esperanto, kvankam dum la lastaj kelkaj jaroj la situacio iomete pliboniĝis. Ĉiuj esperantaj verkoj devas kreiĝi dum liberaj horoj de alia profesio. La plimulto de nacilingvaj verkistoj frontas similan problemon dum almenaŭ parto de la vivo, sed rajtas esperi, ke ili povos gajni sufiĉon per merkado por forlasi pangajnan profesion ofte tute ne amatan. Esperantisto scias ekde la komenco, ke li neniam liberiĝos al kariere nur verkista, eĉ se li verkos je la nivelo arta kaj same amplekse kiel ekzemple Zamenhof, Kalocsay, Baghy, Auld.

Tiu ĉi aparta kaj ofte kruela ekonomia situacio estas grava faktoro en la iom strangaj proporcioj de la panoramo de la esperanta literaturo. Preskaŭ tute mankas verkoj nur profitcelaj: streĉaj, sed literature senvaloraj romanoj, skandala ĵurnalismo kaj similaj efemerajoj, kafotablaj bildlibroj, stereotipaj farsoj. Ne ekzistas en Esperantujo verkistaj klikoj kaj kulisaj intrigoj. Recenzoj persone venĝaj maloftegas. Kie ne estas profito, almenaŭ la homoj ne prostituas siajn talentojn profitele.

Maloftas dramoj pli ol unuak-

taj: dramaturgo scias, ke estas tre neprobable, ke longa dramo prezentigos ie. Ekzistas teatraj trupoj esperantistaj, eĉ tre bonaj, sed ne estas ia teatro, kiu regule kaj profite prezentas esperantajn dramojn al granda publiko.

Maloftas biografioj kaj similaj studaĵoj, kiuj postulas seriozan fakajn esploradojn. Tiaj verkoj postulas eĉ pli da tempo kaj elspezado ol verkoj, kiujn oni povas skribi en la hejmo. Nur esperantisto vere riĉa aŭ kun speciala helpo povus pasigi monatojn en fakaj bibliotekoj kaj poste verki gravan fakajn librojn. Maloftas seriozaj literaturaj aŭtobiografioj.

Maloftas grandskalaj romanoj. Eĉ unu el la plej arte seriozaj esperantaj romanoj, *La granda kaldrono* de John Francis, devis dum jaroj resti en tirkesto. Malmultaj homoj, kiuj povas verki nur dum liberaj horoj post laciga pangajna taglaboro, kapablas verki grandan romanon. Simile mankas grandskalaj verkoj altnivele eksperimentaj. Kie estas, eĉ hodiaŭ, la publiko? Maloftaj estas grandskalaj sciencaj verkoj.

Ĝenerale ankoraŭ restas por esperantaj verkistoj tia ekonomia situacio, ke estas ege malfacile verki kaj aperigi verkojn grandskalajn, precipe grandajn volumene.


Ekzistas tamen respektindaj specimenoj de ĉiuj eblaj literaturaj ĝenroj, el kiuj multaj menciigos poste. Ekzistas ankaŭ eksterordinare riĉa stoko de mallongaj poemoj artisme maturaj, kune kun modere riĉa stoko de noveloj tre diversspecaj kaj aliaj bonaj mallongaj verkoj.

La amplekso de la esperanta literaturo invitas grandan estimon por la kelkcentoj, kiuj verkis esperante, kaj la kelkdekoj, kiuj eldonadis esperante, kaj ties motivoj ne povis esti materialistaj. Ĝi invitas ankaŭ iom da estimon por la kulturavida esperantistaro, ĉar la esperantistoj aĉetas multajn librojn. Mi sufiĉe ofte renkontis esperantistojn, kiuj pro manko de klerigado legas malmulte en la nacia lingvo, sed kiuj legas multe, kaj ofte verkojn surprize altnivelajn kaj malfacilajn, en esperanto. Kiel ofte insistis Julio Baghy, esperanto ne nur estas lingvo: ĝi estas kulturo.

(daŭrigota)

INTE BARA BÖCKER!

Esperantoförlaget kan erbjuda dig även andra artiklar av intresse. Vad sägs om följande?



Kulspetspennor i olika färger med grönt påtryckt "Esperanto"

10 st för 30 kronor

Pennset (kulspetspenna och blyertspenna i ask), eleganta i svart med grönt påtryckt "Esperanto"

Per ask ... 25 kronor

Singelskiva med sång på esperanto av Reine Svensson: "Sven kaj Siv" och "Vivu la stel".

15 kronor per skiva

Musikkassett med sång av Kiruna Motettkör. Sjunger "Du gamla, du fria", Bellmansånger, psalmer. Sammanlagt 10 låtar.

25 kronor per kassett

"Beppehatt" i gult med påtryckt "Esperanto" i en pratbubbla i grönt. Enhetsstorlek.

15 kronor per hatt

Plastmappar i ljusgrön plast med påtryckt "Esperanto" i grönt.

10 st för 25 kronor

Bärpåse av plast, med tryck i grönt och svart ('esperanto' i en pratbubbla) storlek c:a 35x35 cm

10 st för 7,50

Alla dessa artiklar finns att få från EsperantoCentro i Stockholm. Du beställer enklast genom att betala rätt belopp till postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet (obs! postgirot) och ange betalningsorsaken. Porto och moms ingår i ovanstående priser.

TABULO

Kial ne havi korespondanton en Sovetunio! Jen unu propono: 21-jara studento de politeknika instituto kun la kutimaj interesiĝoj: muziko, kulturo, historio, turismo, literaturo, foto...
Vasili Petruŝev, K-Marksa 77-47,
SU-610000 Kirov, Sovetunio.

Vladimir Rotreke, 56-jara instruisto en agrikultura mezlernejo, kolektas bildkartojn pri urboj kaj pri popol-kostumoj. Lia adreso: CS-669 02
Znojmo-Dobšice 297, Ĉeĥoslovakio

Peter Radig, kiu havas 31 geamikojn en 17 landoj de la mondo, ankaŭ en Svedio, havas tiom bonajn spertojn de sia korespondado, ke li nun serĉas korespondantojn por siaj gelernejoj, trideko da ili. Kiel vi komprenas, li bezonas amason da adresoj por ili. Skribu al : Peter Radig, Clara-Zetkin-Platz 21, DDR-8028 Dresden.

Ne ĉiun tagon ni povas publikigi petojn pri korespondado el Hindio. Sed nun ni eĉ havas du! Nepre skribu al ili. La adresoj:
Paul K.T., Amala Asperants House,
Devagiri, Calicut-8, Kerala, S. Hindio
kaj Fransisko Skario, Asperants House,
Devagiri, Kozhikode-8, 673 008,
S. Hindio.
Espereble la adresoj estas ĝuste redonitaj.

Verdokula, brunhara kaj 184cm alta estas la rumana lernanto, 15-jara, kies nomo estas Bogdăn Săndor kaj adreso str. Rozelor 3, 3280 Sing. de Pădure, Mures, Rumanio.

Pri junulinoj de la aĝo 14-25 interesiĝas 26-jara usonano. Li aspektas bone, li mem diras tion en letero, kaj interesiĝas pri historio, muziko kaj arto. Li ne malŝatus lerni ion pri Svedio. Lia adreso estas: Bill Brawner, RR 5 Box 767 C,
Phenix City, AL 36867, Usono.

La Esperantoklubo de Västerås presigis simplan flugfolion kun lingva prezento de esperanto. Vi povas mendi tiajn flugfoliojn ĉe la klubo. 20 ekz. kostas 5 kr, 100 ekz. 20 kr, aŭfranko enkalkulita. Västerås Esperantoklubb, Soldatgatan 40, 723 45 V.

Kiel estas, kiam oni estas 15-jara kaj loĝas en Garvolino en Pollando? Skribu kaj demandu! Tiu, kiu povas rakonti tion al vi estas Matwej Jolanta, ul. Rożana 3, PL-08-400 Garvolino, Pollando. Matwej interesiĝas pri biologio kaj filatelo.

BRASILIIEN-AVGIFTER

gällande t o m 31 mars 1981:

1. Icke medlem i UEA	410 kr
2. Medlem med årsbok	362 kr
3. Medlem med årsbok och "Esperanto"	295 kr
4. Make/maka till (1)	236 kr
5. Make/maka till (2) eller (3)	254 kr
6. Ungdom t o m 20 år	125 kr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	205 kr
8. Synskadad	162 kr

Anmälningsblanketter får du från Asta Schaedel, V. Ronneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09. Du betalar till postgiro 147429-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Anmälningsblanketten skickar du till ovanstående adress.

Examensdag 27 april i år

Det är snart dags att tänka på examen i esperanto! Esperantoinstitutet meddelar, att 27 april kommer i år att vara examensdag. Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 42174 V. Frölunda (tel. 031-29 03 81) tar emot anmälningar och lämnar upplysningar vad gäller lägre examen, medan Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 42171 (tel. 031-40 52 74) vad gäller högre examen.

Läroböcker gås igenom

Esperantoinstitutet har påbörjat en genomgång av läroböcker och annat undervisningsmaterial och har gjort en sammanställning, som det tänker utöka undan för undan.

Om någon har en bra lärobok är Institutet intresserat av att få se den för att göra listan mera fullständig. Man håller på att studera ytterligare några läroböcker och några "historieböcker" som handlar om Zamenhof och esperantos historia.

Skärp er! Rapportera!

Klubbar, hur är det med er? Har ni rapporterat era kurser till Esperantoinstitutet, som varje år håller reda på hur mycket man läser esperanto i Sverige i organiserade former? Hittills har bara 25 klubbar rapporterat för 79/80, så många borde ha dåligt samvete när de läser dessa rader. Skriv snabbt ett kort och tala om vad ni har gjort i fråga om kurser: antal, nybörjare/fortsättnings-/konversation, antal deltagare på varje kurs.

Rapporten skickar ni till Märtha Andréasson, 2265 Tollerød, 425 90 Hisings Kärra.

Ny broschyr om Sydostsverige

Under världskongressen kom flera lådor trycksaker till Folkets hus. Det visade sig att lådorna innehöll en ny turistbroshyr om sydostliga Sverige, ett stort område från Blekinge till Östergöt-

JESONE

land. Mittan innehåller en bra karta över området, i övrigt finns många fina bilder i färg med och beskrivning av olika bilturer inom området.

Beställ broschyren till dig själv och till dina bekanta utomlands. Skriv till Turism och Fritid i Jönköpings län, Box 1027, 551 11 Jönköping och be om att få "Mapo de Sudorienta Svedio". Det kostar säkert ingenting.



Får vi snart en bokklubb?

Man håller på att diskutera inom Esperantoförlaget, hur man får fler svenskar att köpa esperantoböcker. En idé som snart blir verklighet är vad man skulle kunna kalla bokklubb.

En grupp bestående huvudsakligen av medlemmar i Tyresö esperantoförening kommer att hålla i trådarna. Vad man tänkt sig är att göra beställningarna av böckerna så enkla som möjligt. Man kommer att välja framförallt lättlästa och inte alltför dyra böcker, ungefär en bok i kvartalet. Nästa nummer av *La Espero* kommer troligen med en annons om denna nya "bokklubb". Som första titel kommer förmodligen Johán Valanos nya deckare (hans tredje) att erbjudas.

Tycker du redan att det är en vettig idé att få större spridning på esperantolitteraturen och tänker anmäla ditt intresse? Skriv några rader till EsperantoCentro; då får du säkert det första

cirkuläret som håller på att framställas.

Res söderut i april!

Det är inte alls dumt att åka till Danmark i april. Har du ingen anledning att göra det? Jo men visst! Danska esperantister har sin årskongress den 3, 4 och 5 april i Fredericia.

Kongressen bjuder på sammanträden och möten, bl a på föredrag av Ib Schleicher från Köpenhamn om "La graveco de la unuopa esperantisto" — "Den enskilde esperantistens betydelse" och på film om Brasilien.

Du kan få fler informationer från Esperantoårskongressen, Børge Christiansen, Dalsgaardsvænget 2, DK-7000 Fredericia.

"Ni promesas al vi interesajn, streĉajn kaj festajn tagojn" påstår Fredericias esperantoklubb som står för arrangemanget.

Sveda muziko sur nova kaseto

El Kiruna venas tute nova muzik-kaseto kun sveda muziko — en esperanto. Tute nova ĝi fakte ne estas, ĉar ĝi ekzistis jam kelkajn monatojn, sed apenaŭ iu sciis pri ĝi. Oni vendas ĝin en la EsperantoCentro en Stokholmo por 25 kronoj. Estas jam tempo, ke ankaŭ aliaj, ne nur la ekskluziva klubo, kiu vizitas la EsperantoCentron, eksci pri ĉi tiu kaseto.

La muziko, kiun oni proponas, estas tiom sveda kiom entute eblas. La grupo de dek kantoj, kiuj troviĝas sur la kaseto, komenciĝas per *Vi alta, libera kaj daŭriĝas per la same tutsveda Vermlando vi belega*. Carl Michael Bellman estas reprezentita per entute tri kantoj: *Ulla, ho Ulla, Flirtas Haga papilio* kaj *Patro Noa*, tri veraj klasikuloj. La posta kanto estas originale verkita en esperanto de Tiberio Morariu. Temas pri *Norda sento*, al kiu E. Windeballe faris muzikon.

Du kantojn kontribuis CJL Almquist, tradukita de LG Karls-

son, nome *Aŭskultanta Maria* kaj *La sorĉistino en la tempo de reĝo Karl*. Aliaj du kantoj estas psalmoj, la 23a kaj la 42a, tradukitaj de Zamenhof kaj adaptitaj de LG Karlsson.

Tiuj, kiuj kantas estas Kiruna Motettkör, kelkfoje kun akompano de ia instrumento.

Ambaŭ flankoj de la kaseto estas registritaj per la sama programo, do vi ne bezonas rebobeni por aŭskulti dekomence. La prezo estas, kiel dirite, nur 25 kr. Vi povas mendi ĉe Esperanto-Centro, prefere per pago de 25 kronoj al la poŝtĝiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

La kaseton eldonis la esperantoklubo de Kiruna kaj Eldona Societo Esperanto. Tekstfolio estas aldonita.

Forlasis nin por ĉiam

Jam pasintomere mortis en Sölvesborg **Ella Nilson**, 79-jara. Tre juna ŝi lernis esperanton kaj estis regula vizitanto de Universalaj kongresoj: la unua en 1929, la lasta en 1977. Entute ŝi vizitis 25 UK. Lingve tre kapabla ŝi kontribuis al la *Sveda antologio* per tradukoj.

Elin Zandrén mortis en Falköping 85-jara la 28an de oktobro 1980. Ŝi estis instruistino dum sia tuta aktiva vivo.

La 12an de novembro forpasis **Ingrid Säfvert**, membro de Grupo Esperantista de Stockholm dum multaj jaroj.

En Mora mortis **Helge Frisk** je la aĝo de 71 jaroj, la 22an de oktobro 1980. Li ĝis la fino fervore agis por esperanto, kiu estis lia ŝatata intereso ek de kiam li lernis ĝin 23-jara. Li sukcesis fondi diversajn klubojn, gvidis kursojn kaj interpretis.

Helge Frisk estis tipa esperantisto: ĉiam optimisma, riĉa je ideoj, aktiva.

En Hägersten, Stockholm, mortis fine de decembro **Natanael Svanholm**, instruisto, je la aĝo de 81 jaroj. Li lernis esperanton post la dua mondmilito. Li estis bona kantisto kaj foje kontribuis al esperantokongresoj. Li ankaŭ komponis novan muzikon por *La Espero*.

La 24an de januaro forpasis en Nybro **Tage Borgström**, 85-jara frizisto. Esperanton li lernis en

Halmstad je la fino de la 20-aj jaroj. En Nybro li iniciatis kaj kunfondis la esperantoklubon, kies sekretario li estis dum 30 jaroj.

Dum 50 jaroj li fervore laboris por esperanto.

En Skara mortis la antaŭa episkopo **Sven Danell**, longjara esperantisto kaj ŝatata predikanto ĉe multaj diservoj organizitaj kunlige kun la jarkongresoj de SEF.

En Malmö forpasis **Esther Wallin**, kiu lernis esperanton jam en 1931, partoprenis kongresojn kaj aktive en la kluba laboro en

Malmö. Dum la tuta vivo ŝi montris vere grandan intereson por nia movado.

En Farsta, Stockholm, forpasis **Janet Enghardt**, ankoraŭ ne 50-jara. Ŝi naskiĝis en Usono, sed havigis al si svedan edzon, ankaŭ esperantiston. Ŝi estis landa delegito de UMEA kaj ankoraŭ en januaro direktis al *La Espero* alvokon al svedaj medicinistoj esperantistoj fondi medicinan esperanto-rondon. La 14-an de februaro ŝi ne plu estas inter ni.

Niajn plej sincerajn kondolencojn al la parencoj de niaj forpasisintoj!

PERSONE

Ankaŭ seriozaj viroj kelkfoje atentindas

Revene al mia loĝurbo de mallonga vizito al parencoj, mi ricevis en la trajno sidlokon vidalvide al du seriozaj viroj, evidente partoprenintaj iaspecan konferencon. Blanka ĉemizo kun kravato, sobraj pantalono kaj jako kaj nemankebla nigra teko malkaŝis tion. Ili povus esti vendistoj; sed ili nedifinebla sur ili igis tion ne tre verŝajna. Eble la parolmaniero aŭ la fakto, ke vendistoj ĉiutage posttagmeze ne kutimas veturi hejmen. Ke ili veturis hejmen, tion malkaŝis ilia dialekto kaj kelkaj eldiroj je la eniro en la vagonon.

Post la enkonduka saluteto kaj reciproka kaptado mi ne plu atentis pri ili, sed profundigis en libron, kiun mi kunportis.

Post iaj du horoj mi kvazaŭ vekigis el la legado: ili ja parolas pri esperanto! Kaj fakte: la pli aĝa el la du viroj rakontis al la pli juna, ke li vizitas esperantokurson.

Mi daŭrigis rigardi en mian libron, sed atente tiris la orelojn por kapti ĉiun vorton. Post mira demando de la pli juna sinjoro

sekvis preskaŭ prelego de la pliaĝulo pri la avantaĝoj de esperanto, pri liaj propraj spertoj kaj klopodoj lerni la lingvon (li provis jam pli frue, sed devis interrompi pro soldatservado dum la dua mondmilito).

Mi neniam sentis bezonon interveni. Li bone prezentis siajn argumentojn kaj li estis surprize bone informita pri la esperantomovado por esti komencanto.

Poste li parolis pri la kurso: li skizis anekdote la diversajn kursaĵojn kaj ne ĉiuj aprezus liajn vortojn pri ili. La instruiston li ŝajne tre aprezis. Li estis laŭ li absolute kompetenta pedagogo, inspiriga dum la lecionoj, adaptiĝema al la unuopaj kursaĵoj. Kaj ĵu pli li parolis pri tiu mirakla instruisto, priskribante ankaŭ alian aspekton kaj konduton, des pli klare mi vidis, ke mi konas lin. Sed tio ja ne estas stranga, kiam temas pri aktivaj esperantistoj el la sama urbo.

Kiam la trajno haltis en nia urbo kaj ni jam surhavis la mantelojn, mi turnis min al la pliaĝulo: "Mi hazarde aŭdis ion da via interparolo pli frue, speciale tion pri via partopreno en esperantokurso. Mia edzo estos certe tre kontenta, kiam mi rakontos al li pri via laŭdoj rilate al li. Ĉu mi salutu al li, kaj se jes, de kiu?"

Mi ne bezonas priskribi la surprizitan mienon, kiu sekvis tiujn vortojn.

Ĉaŭ kiel kutime!

Eta Mi

BABELS TORN

Läser du något intressant om språkproblem, om hur snedd språksituationen kan vara — skicka det klippet till La Espero. Hela artikeln kan vi kanske inte ta med, men gärna några tillspetsade meningar. Glöm inte att ange tidningens namn och datum.

ETC 80/3

— Om andra länder vet vi inget, svarar Munuswamy. Vi vet ju inte ens något om andra stater inom Indien. Kanske säger de engelskspråkiga radioprogrammen något, men dem förstår vi ju inte. Vi får lita på den officiella informationen på vårt eget språk, tamil. Den säger att folk som har stora familjer blir fattiga.

Byråkratin har ju som princip "sine ira et studio" (utan vrede och iver d v s opartiskt). Den blir effektivare ju mer den avlägsnar sig från känslor och andra irrationella element som inte kan beräknas — prissättas.

För att uppnå denna avgränsning är språket ett av de viktigaste medlen. Gör man det tillräckligt abstrakt, tillräckligt avlägset från vår vardag och verklighet, tillräckligt opersonligt så kan man nå oanade resultat. Vi kan förmås att godta värderingar och ingripanden som utsagda i klara ord skulle få oss att spy.

JD 81-02-5112

DN 81-02-12

Beroende

Jag bläddrar i en broschyr som jag just fått i min hand. Broschyren innehåller slagord på engelska, bilder från popgalor och diskotek och skrivstudio. Softade bilder på kändisar och på unga männtade mot stora amerikanska bil-lar. Vad handlar det hela om? Jo, om en antirökkampanj som snart ska dra i gång. Under kampanjen kan man få köpa tröjor med texten "A non smokan man också få gratistidningen "A Smokefree World" hem i brevlådan.

Ungdomar — ska ni sluta röka, så ska det ske i den amerikanska diskokulturens tecken och hör sen! Ont ska med ont fördrivas nämligen.

Viktoria

Engelskundervisningen på lågstadiet i Västerås försvinner efter innevarande läsår.

Ända sedan 1970 har eleverna i årskurs tre fått läsa engelska, men den undervisningen förläggs hösten 1981 till årskurs fyra i stället. Eftersom man inte lyckats uppvisa något högre studieresultat i engelska hos eleverna trots att de börjat i trean istället för fyran är det ingen mening med att fortsätta.

VLT 80-12-17